

Heinrich Heine,  
Teksista kanto

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ĉe siaj teksiloj la dentojn grincante  
Sidadas teksistoj jen, ne plorante:  
Ni teksas trioblan malbenon por vi  
En vian morttukon, Germani’.  
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al tiu ĉi surda Dio,  
Infane ni kredis je la religio.  
Ja vane esperis, atendis ni,  
Simiumis kaj mistifikis nin Li.  
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al tiu fireĝ’ de l’ riĉuloj,  
Kiu ne kompatis je ni mizeruloj,  
Ĉantaĝas la lastajn groŝojn el ni,  
Kiel hundojn nin pafmortigigas li.  
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al tiu ĉi falsa patrio,  
Kie nur prosperas la koterio,  
Kie estas rompata ĉiu juna flor’,<sup>3</sup>  
Kie regas de l’ putro la odor’ -  
Ni teksas, ni teksas!

Navedo flugas kaj krakas teksil’,  
Ni teksas senlace dum nokta trankvil’ -  
Morttukon ni teksas, Germanujo, por vi,<sup>4</sup>  
Enteksas trioblan malbenon ni,  
Ni teksas, ni teksas!

*Traduko de la Germana poemo “Die schlesischen Weber” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

*Arg-243-491 (2005-11-20 18:13:42)*

*Esperantigita de Manfredo Ratislavo (Manfred Retzlaff) en 2001-04-08 laŭ la germanalingva teksto, kiu post la publikigo de la unua versio en la revuo “Vorwärts!” (= “Antaŭen!”), eldonita de germanaj fuĝintoj, estis diskonigita en Germanio sur flugfolioj. En tiu flugfolia versio la poemo havis la titolon “Weberlied” (= “Teksista kanto”). [Laŭ interreta informo de l’ 27.05.04 de la Instituto Heinrich Heine, Düsseldorf, s-ino Marianne Tilch.]*

---

<sup>3</sup>aŭ: Kie frue rompatas ĉiu flor’,

<sup>4</sup>aŭ: Morttukon, ni teksas por vi, Germani’,  
Trioblan malbenon enteksas ni.